



# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 12 Decembro, 2010

*Kara Leganto! Tradicie (de 2008) antaŭ la Zamenhofa tago ni aperigis rakonton de nia samsocietano Gregoro Dolgin. Ankaŭ ĉi n-ro proponas al vi "streĉitenhavan detektivon por infanoj kaj gepatroj". Sed dekomence bv atente legi la informon pri la Zamenhofa bankedo. Karaj gesamideanoj, feliĉan Zamenhofan tagon!!!* –La Redakcio

**Zamenhofa Tago:** ZT'2010 okazos la 12an de Decembro en la sama loko, kie pasintjare: 415 Howard Street, Evanston, IL 60202. La gast-salono estos je nia dispozo inter 12 kaj 4 pm. Apudas (1 min. piediri) trajnstacio de la ruĝa linio "Howard Street". Sur la kontraŭa stratflanko je via dispozo grandega senpaga parkejo. Vin atendas – bongusta barata manĝaĵo kun polaj dolĉaĵoj, tutmondaj fruktoj kun aŭstralia vino, riĉa kultura programo. Tre Gravaj Personoj estis invititaj kiel gastoj. –LOK

## Kiu Savis la Etulinon?

Baldaŭ Nika iĝos nur 7-jara! Tial ŝi rakontas helpe de l' avo:

«Tio okazis la 1-an de junio 2010 en nordokcidenta Ĉikago apudurbo. Mia panjo ekaŭdis signalon, kiu anoncis finon de ties labortago. Ŝi elŝaltis komputilon, aliajn aparatojn, metis la okulvitron en la ingon kaj imagis, ke post dudek minutoj ŝin renkontos kato laŭ nomo Vaŝjka, post li – Nika, t.e. mi kaj la avino. Mia paĉjo, tamen, devis veni iom poste.

El laboratorio eliradis kunlaboristoj. Iuj el ili diris: bye-bye, aliaj mansvingetis, kio signifis: «ĝis morgaŭ!» Panjo, alirinte sojlon de l' pordo, elŝaltis ankaŭ lumigilojn. En sama momento eksonis muziko de ŝia portebla telefono.

– Vita, – diris la avo, – mi estis malproksime, en oficejo N., kiu invitis min por klarigi cirkonstancojn de averio, pri kiu vi scias. Mi decidis reveni ne per tri busoj, longatendante ilin, sed per unu, kaj por tio mi iradis rekten 11 kilometrojn. Buso de l' itinero laŭ Milwaukee Avenue veturigis min ĝis Dundee Road. Plie necesas marŝi ankoraŭ 7 kilometrojn. Tamen stratkruciĝo Dundee kaj Milwaukee estas por vi preskaŭ laŭvoje...

– Certe, ni renkontiĝos, – diris panjo, – ni renkontiĝos tie ĉe vendejo Walgreens.

Post dek minutoj panja Toyota atingis la interkonsentitan parkejon. Avo devis aperi ĉi tie baldaŭ...

Antaŭe panjo ne sukcesis tagmanĝi. Ŝi estis malsata kaj laciĝinta. «Necesas aĉeti almenaŭ kekseton, – decidis ŝi, eniris la vendejon kaj subite ekaŭdis porkidan akutrion. Similaj sonoj aŭdeblas foj-de-foje ĉe vilaĝaj bestfarmoj, sed en magazeno Walgreens – unue! Porkido kuŝacis sur la ŝtona planko, ŝovis per siaj kvar kruretoj kaj sonigis: «I-i-i!»... Panjo alkuris ĉi lokon. Evidentiĝis,

ke tie kuŝacis kaj kriis ne porkido, sed etulino, ĉirkaŭ kvarjara.

– I-i ku-ku-pi-pi, ku-pi\*! – kriploris ŝi. Apude staris ploranta sensone dekdujara junulino kaj pala pro la timo iom pli aĝa junulo. Ili penis levi la etulinon, tamen ŝi denove faladis sur la plankon kaj eĉ pli orelbore kriegis. «Ho, ja ili estas du fratinoj kaj frato! – divenis mia panjo, – jen kio »... La etulino premis en sia manplato negrandan keston kun pentrita sur ĝi longorela hundo.

– Ku-ku-pi-pi! – kriegis ŝi denove. Mia panjo komprenis, kio elvokis larmojn de ŝia fratino kaj timon, eĉ teruron de l' frato: «La vendejestro tuj kaptos telefonon! Post tri minutoj ĉi tie aperos policistoj». Frato de l' histeria etulino imagis, kiel oni veturigis lin kaj la du fratinetojn en la polic-aŭto, poste metos ilin en ĉelon kun kruditaj fenestroj, alvokos la gepatrojn, enmanigis al ili fakturon de monopuno. «Vi certe scias, kio estas forŝtelado de infanoj, – diros ŝerifo al la gepatroj. – Tial akompani infanojn devas pli ol 18-jaraĝa plenkreskulo. Tamen via filo estas nur 15-jara».

Lin kun la mezaĝa fratino kaj la gepatrojn oni ellasos. Kaj Lusi? Ĉu oni transdonos la etulinon en orfejon aŭ al alia familio por «pli taŭga edukado», ĉu transdonos ŝin por ĉiam?

– Ha, kiu ploras ruse kiel porkido aŭ hundeto? – demandis mia panjo.

– Mi estas nek porkido, nek hundeto, – plorĝeme respondis la etulino.

– Se tiel, ĉu necesas al vi hunda nutraĵo? – ekmiris mia panjo.

La etulino, forviŝante larmojn, silentis. Almenaŭ tio estis bona. Ŝiaj frato kaj fratino, miksante vortojn en la rusa kaj angla, diris:



– Spasibo oĉenj, thank you very much\*\*! Ni venis ĉi tien, por aĉeti liniilon kaj cirkelon. Restis 22 cendoj, tamen hunda nutraĵo ja kostas plie.

– Por kio, Lusi, por kio vi kaptis tiun ĉi keston? – ripetis la frato, – ja vi ne estas malsata. Kaj ni ne havas hundojn...

– Ĉu vi forgesis? – riproĉis Lusi. – Nia panjo spektas hundon Muĥtar je televidilo. Kaj mi volis regali Muĥtaron.

– Kia stultulineto! – ekspiris la fratino. Kaj turninte sin al mia panjo diris: «Bonvolu pardoni pro la ĝeno kaj ne plu klopodi. Ni loĝas proksime, eĉ ne necesas trairi pavimon.

– Do, mi akompanos vin, – proponis mia panjo. – La vendejestro kaj aliuloj supozos, ke mi estas via onklino. – Trankviliĝu, Lusi. Muĥtar ricevas regalaĵojn ĉiutage. Sed via panjo atendas donacon plenjare, al sia naskiĝtago. Preparu donacon al via panjo. Por la orkidojn por ŝi. Via fratino montros kiel pentri la florojn.

Ne pasis eĉ kvin minutoj, kiam ili atingis la 6-etaĝan, belan domon. Kiam ties lifto suprenlevis la infanojn, mia panjo ekrapidis reen al la vendejo. Ekde alia flanko jam proksimiĝis mia avo.

– Aŭtobuso malfruiĝis por 15 minutoj. Neniam antaŭe tiom multe, – diris li.

Ili revenis hejmen kaj post la vespermanĝo rakontis al ni pri la okazintaĵo. Al komenco de l' rakonto sukcesis paĉjo. Eĉ kato Vasjka aŭskultis atente.

– Ĉu oni forprenus la etulinon por ĉiam, eĉ sen ebleco viziti ŝin?! Ĉu la policistoj kaj la juĝisto estus tiel kruelaj?! – timeme demandis la avino.

– Ne, – diris la avo, – preskaŭ ĉiuj policistoj en Usono estas bonaj, atentaj. Foj-foje policistoj kaj fajrestingistoj riskas mem, penante savi aliulojn. Ankaŭ min, tuj post la averio, savis policisto. Tamen en ĉi lando ĉiuj devas obei al ordo, ankaŭ infanoj. Ties estro ne sukcesis elvoki policistojn. Kaj la historio povus havi happy end. Tamen pripensu: kiu kulpas en la plago, peskaŭ okazinta? Ĉu la hundo Muĥtar sur televidekrano?

– Do, ĉu savo de l' knabino, kiu ignoris regulojn, rezultiĝis pro nia avo, kiu obeis regulojn? – demandis paĉjo. – Poste iu «bondeziranto» diris: «Se movus laŭ ruĝa stratsignalo vi, sed ne tiu longorela arogantulo, la averio ne okazus. Ĉu vere?»

Ajna averio ne aperas hazarde. Des pli ne estas hazarda tiu ĉi stranga historio. La unua meritas dankesprimon al policisto, kiu savante nian avon, lige de tio savis etulinon Lusi, ja aliel kun ŝi ne renkontiĝus mia panjo. Kontribuis la koincidon ankaŭ oficejo N., kiu fiksis viziton por la avo ĝuste por tiu tago, kiam Lusi decidis regali Muĥtaron rekte tra la televidekrano. Avo tramarŝis distancon de 11 kilometroj! Ĉu pro tio, ke jena itinero estas pli kurta? Ja ne! Li superis ties longan distancon kvazaŭ speciale, por ke lia filino (mia panjo) trafus je la necesa tempo en bezonatan lokon! Kaj la aŭtobuso, unuafoje tiel malfruiĝante, ŝajnis kiel saĝa, ja tiamaniere ĝi kvazaŭ sugestis al panjo: «Eniru la vendejon Walgreens, aĉetu kekseton!» Panjo foriris el la vendejo sen kekseto, tamen ŝi savis la etulinon.

Sorto similas al granda kalejdoskopo. Kiam ĝi montras belan ornamaĵon, ŝanĝi en ĝi almenaŭ ion jam ne eblas. Vi povas anstataŭigi la ornamaĵon, tamen la nova simbolo jam sorton alian.

Aŭskultinte rakonton de sia panjo, Nika decidis surpaperigi ĝin, kun helpo de l' avo. Poste ŝi trovis en sia ĉambro kalejdoskopon kaj longe observadis enigmajn ornamaĵojn. Baldaŭ Nika iĝos nur sepjara. Tial por ŝi dume estas malfacile kompreni sekreton de kalejdoskopoj. Sed avino de Nika konkludis jene: «Konsideru, infanoj, la eventon kiel ekzemplo!»

\*kupi – (ruse) aĉetu

\*\*dankesprimo en la rusa kaj la angla

–Nika kun la avo Gregory S. Dolgin



## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktoro Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library  
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL  
Kunvenoj komenciĝas  
je 7 p.t. en la Suda  
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

12an de Decembro – tradicia Zamenhofa Tago: 415 Howard Street, Evanston, IL 60202. La gast-salono estos je nia dispono inter 12 kaj 4 ptm.

25an de Januaro – d-ro Kordylewski: “Bahaa kredo”